

3 naturkuracaj eventoj en Herzberg en 2011



Tri naturkuracaj eventoj en Herzberg en 2011

Harald SCHICKE, Germanio

La Esperanto-urbo *Herzberg am Harz*, Germanio, aliros venontjare ne nur la atenton de la esperantistoj. Tri naturkuracaj eventoj okazos.

La INA-Konferenco

La plej grava sendube estos la 25-jara jubileo de INA okazonta de de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto, kiun ĉeestos du de la kunfondintoj:

Korea Kompleksia Akupunkturo

- nia Honora Prezidanto D-ro Puramo CHONG (Koreio/Usono), kiu prezentos ankaŭ propran seminarion pri la korea kompleksia akupunkturo *Sa-am*. La preloj estos en Esperanto, interpretata al la germana lingvo. Tiel povos partopreni esperantistoj kaj germanoj. Tiu seminario okazos de la 5-a ĝis 7-a de aŭgusto. Ĝi estas destinita al fakuloj. La semina-

rio estas aparte pagenda kaj kostas 395 eŭrojn. Tiu seminario estas elstara, ĉar ĝi okazos la unuan fojon en Germanio. Duono de la eblaj partoprenontoj jam aliĝis. Tiu seminario estos tute praktika kaj tial limigita.

- Kees RUIG, Nederlando, kiu prelegos ankaŭ dum nia 4-a INA-Konferenco.

Ĉina Tradicia Dieto

Krom tiuj du eventoj, kiujn organizas INA, okazos tria, kiun organizas germana asocio de naturkuracisto *Berufs- und Fachverband Freie Heilpraktiker* (profesia kaj faka asocio de liberaj naturkuracistoj).

Ĝi same okazos en Herzberg. Tiun seminarion prezentos WANG Disheng (vidu la titolpaĝon, kiu montras lin en sia hospitalo kaj postan artikolon) estas same elstara kiel tiu de D-ro Puramo Chong. Ĝi okazos same en Esperanto kun interpretado al la germana. □

La urbestro de Herzberg salutas la partoprenontojn de la 4-a INA-Konferenco



La konsilio kaj administrado de la urbo Herzberg am Harz gratulas je la 25-a jubileo de INA kaj deziras por la estonteco multe da sukceso.

La urbo Herzberg precipe ĝojas pri tio, ke la jubilea konferenco de INA okazos en la Esperanto-urbo Herzberg kaj denove homoj el diversaj kontinentoj renkontiĝos. Mi tiel salutas ĉiujn gastojn tre kore, deziras al vi

agrablan alvenon, bonan restadon kun pozitiva opinio-interŝanĝo kaj sukcesajn tagojn en Herzberg.

Al la organizaĵoj de la jubileo mi multe dankas kaj deziras al vi ĉiuj multe da sukceso kun viaj seminarioj.

Gerhard Walter
Urbestro

La seminario de Wang

Disheng (12-a - 15-a de aŭgusto 2011)

WANG Disheng, Ĉinio

Plibonigi la ren-funkcion por teni sanon kaj kuraci malsanon

Jen la temoj, kiuj estos prezentataj:

- La efekto de la renoj en sante-
nedo kaj malsankuracado
- La efekto de la renoj en san-
tenado
- La koncepto kaj fankcioj de la
renoj en TĈM.
- La rena rango en la kvin
zhangfu-organoj.
- La rena rolo en evoluade la
homkorpo.
- La rena rolo en la teorioj pri ĉi-
o, sango, jinluo.
- La rena efekto en malsan-ku-
racado.
- La rena rilato kun diabeto.
- La rena rialto kun osta kom-
pakseco.
- La rena rialto kun ensanga alt-
lipido.
- La rena rialto kun seksa mal-
funkcio.
- La rena rialto kun demenco.
- La rena rialto kun hipertensio.
- La rena rialto kun kor-malsa-
no.
- La studado de la moderna
medicino pri la rena funkcioj
en la koncernaj malsanoj kaj
santenado.
- Hipotalamio-hipofizo-cel-glan-
do (surrena glando, tiroido,
seks-glando)
- La ren-efekto sur la imuna sis-
temo
- La ren-efekto sur ĉel-apoptosi-
so (apoptosis 凋亡)
- La ren-efekto sur nerv-endo-
krina sistemo
- La ren-efekto sur bio-informo
kaj ĝia transsendo
- La ren-efekto sur seks-glando
- La ren-efekto sur kontraŭ-
bioksigiĝo
- La ren-efekto sur la ŝanĝo de
fiziologia indekso.
- La ren-efekto sur la spir-siste-
mo.
- La ren-efiko kontraŭ kancero.

- La ren-efiko sur urin-sekrecia sistemo.
 - La tradicia ĉina drogo por tonikumi la renojn.
 - Juna cervokorno
 - Hipokampo
 - Marurs-renoj
 - Vira bombikso
 - **Kordicepso (*cordyceps sinensis*, vidu la foton)**
 - Pore-semo
 - Kuskut-semo (semen cucurbitae)
 - Eukomi-ŝelo (cortex eucommiae)
 - La manĝaĵoj por tonikumi la renojn
 - Holoturio
 - Jugland-kerno
 - Nigra sezamo
 - Ignamo
 - Ŝafaĵo
 - Paserajaĵo
 - Salikoko
 - Aliaj specoj de kernoj: kaŝtano, avelo, abrikoto, anakardio.
 - Masaĝado por tonikumi la renojn
 - La akupunkturaj punktoj
 - La masaĝ-metodo (masaĝ-manipulado)
 - Por teni sanon ankaŭ tonikumi lien-ci-on.
 - La liena rolo kaj ĝia rialto kun la renoj
- La ĉefa drogo (TĈM) por tonikumi lienon
 - La manĝaĵo por tonikumi lienon
 - Por teni sanon ankaŭ apliki la drogon aŭ manĝaĵo pliaktivigi sang-cirkuladon kaj disigi stagnon.
 - La ĉefa drogo (TĈM) por pliaktivigi sang-cirkuladon kaj disigi stagnon.
 - La manĝaĵo por pliaktivigi sang-cirkuladon kaj disigi stagnon.



Foto: Nicolas Merky en Vikipedio

La seminario de Puramo Chong

(5-a - 7-a de aŭgusto 2011)

Harald Schicke, Germanio

„Kompleksia Medicino kaj Saa-
ma Akupunkturo“ estas la titolo
de la libro de D-ro Puramo
Chong, kiu aperis jam en 2003
en Esperanto kaj en la germana
lingvo.


De tiu tempo multaj germanaj
naturkuracistoj deziris havi se-
minaron pri ĝi. Dum nia jubilea
INA-konferenco tiu revo rea-
liĝos.

Antaŭkondiĉo por la partopreno
en la seminario estas la studado
de tiu libro. La Esperanto-versio
estas havebla ĉe la libroservo
de UEA por 31,20€, la germana
ĉe ĉiu librovendejo en german-
lingvaj landoj por 50,00€ aŭ rekte
ĉe la eldonejo [MZ-Verlag](http://www.mz-verlag.de).

La seminario estos precipe
praktika. Oni lernos distingi la
kompleksiojn, ekzemple per la
pulsalpado aŭ per la o-lingva
testo.

La partoprenantoj ekzercos trovi
la punktojn kaj la manieron aku-
punkturi ilin.

La granda avantaĝo de la saa-
ma akupunkturo ja estas, ke ĝi
limiĝas al nur 60 punktoj, kiujn
oni rapide lernas kompare kun
la pli ol 600 de la ĉina akupunk-
turo kun siaj komplikaj reguloj.



D-ro Puramo Chong nun laboras
en Usono. Tie li havas same
multajn sukcesojn, kiujn mi vidis
en lia kuracejo en Koreio.


La partopreno en la seminario
estas bona investo por la profesia
sukceso.

La libroj de niaj prelegontoj

Harald Schicke, Germanio


Tri el niaj prelegontoj verkis librojn en Esperanto, kiuj estas ankoraŭ haveblaj.

Nia Honora Prezidanto D-ro Puramo Chong verkis la libron menciitan sur paĝo 6.



Magistro Wang Disheng verkis pri la temo de sia seminario: Tradicia Ĉina Dieto.


Ĝi estas havebla en la libroservo de UEA por 8,70€ aŭ dum la INA-Konferenco.



Ankaŭ la nuna prezidanto de INA verkis du librojn, kiuj vendiĝis en Esperantujo tre sukcese.

„La korpo de la homo“ vendiĝis milfoje kaj estas delonge elĉerpita. La nova eldono - kolora -

estas en preparo. Ni esperas reeldoni ĝin antaŭ nia INA-Konferenco.



La dua libro kun la titolo „Germanaj biero kaj bierkulturo“ vendiĝis pli ol 800-foje kaj estas ankoraŭ havebla. Ĝi estas plenkolora. Ĉe UEA ĝi estas havebla kontraŭ 13,70€. Dum la INA-Konferenco ĝi ankaŭ estos havebla.

Bedaŭrinde la libromarkato por faklibroj en Esperanto ne floras. Kelkaj tre bonaj verkoj ne vendiĝas sufiĉe. Tial ankaŭ nur malmultaj aperas.

Je www.naturkuracado.info vi povas legi la libron de nia mortinta membro D-ro Jaime Scolnik kun la titolo „Sanon!“.

Je la retpaĝaro de INA www.ina-asocio.info vi trovas ne nur ĉiujn ĝis nun aperintajn INA-revuojn, sed ankaŭ multajn apartajn artikolojn.

Tie vi ankaŭ trovos ĉiam la plej novajn informojn pri la 4-a INA-Konferenco.

Bonvolu frue aliĝi por helpi al bona organizado.



Kion faras la alopatio?

D-ro Jaime Scolnik †, Argentino

La alopacia kuracisto antaŭ iu ajn el la menciitaj malnormalaĵoj, nur vidas malbonaĵon, kiun oni devas kontraŭbatali per ĉiuj fortoj. Ju pli rapide ĝi malaperas, des pli granda estas la sukceso; tion opinias la kuracisto kaj la malsanulo.

Kontraŭ la doloroj de la kapo aŭ de aliaj partoj de la korpo li preskribas iun sendolorigilon (aspirinon, antipirinon ktp.); kontraŭ la lakso, adstringaĵon (tanninon, tanalbinon aŭ alian); kontraŭ la mallakso, laksilon; kontraŭ la manko de apetito, iun amaran substancon; kontraŭ la sendormeco, sulfonalon, luminalon, kloralon, bromidon ktp. Kaj tiel sinsekve.

Evidente, tiuj ĥemiaj drogoj baldaŭ efikas: malaperas la kapdoloro, ĉesas la diareo ĉe la laksulo, la mallaksulo fekas, la sendormulo dormas, kaj la senapetitulo eble reakiras apetiton.

Liborigita momente de la malbonaĵo, la paciento sin konsideras sana kaj daŭrigas sian an-

taŭnan vivsistemon. Lia korpo plue akumulas malpuraĵojn kaj senprokraste reaperas la unua malnormalaĵo. Denove li uzas drogojn kaj tiel estiĝas neelirebla rondo en kiun enfalas la kompatinda malsanulo kaj el kiu estas des pli malfacile eliri, ju pli longe ĝi daŭras.

Estas necese kompreni unu fokon por ĉiam, ke la drogoj ne kuracas nek povas kuraci la malsanojn. Ili nur servas por "stopi" la simptomojn, ŝajnigante ke ili resanigas.

El tio oni povas konkludi, ke la oficiala aŭ alopacia medicino, kiun oni lernas en la universitatoj, tute ne estas scienco; ĝi nur estas pseŭdoscienco, bazita sur la eraro, kiu kondukas nur al fasko. Tion atestas milionoj da malsanuloj vagantaj tra la mondo kaj kies resanigo des pli malproksimiĝas ju pli "progresas" la alopacia medicino.

Sin dediĉi al simpla "stopado" de simptomoj, estas tasko tiel malsaĝa kiel tiu de ministro, kiu,

enirante la subterajn galeriojn, estingus ĉiujn lanternojn kaj lampojn, kiujn li renkontus laŭ sia vojo: baldaŭ li sin trovas en mallumo. Same la simptomoj, kiujn prezentas la paciento, estas kvazaŭ lanternoj lumigantaj la scenon pli aŭ malpli malhelan de la malsano.

La simptomo estas signo de alarmo de la naturo. Kiam ĝi prezentiĝas, oni devas serĉi la kaŭzon, kiu ĝin okazigas por povi elradikigi ĝin: kiam malaperas la kaŭzo, ankaŭ malaperas la efiko. Ĝuste tion faras la natu-rismo.

Farante la kontraŭon, estas kvazaŭ mortigi la gardostaranton, kiu avertas nin pri la proksimeco de danĝero; aŭ ni donu pli trafan ekzemplon: estas agi kiel la struto, kiu enŝovas la kapon en la sablon, kaj kredas ke tiel ĝi evitos la alproksimiĝantan katastrofon.

Legu pli je www.naturkuracado.info.

INA-revuo estas la oficiala organo de Internacia Naturkuraca Asocio (INA)

Ĉefredaktoro kaj eldonisto:
Harald Schicke
Adreso de INA:
Harald Schicke (prezidanto)
Hauptstr. 38
37412 Herzberg am Harz -
la Esperanto-urbo, Germanio
mzverlag@web.de
www.ina-asocio.info

Adreso por korespondado kaj membroadministrado:
Rosa Ebel (sekretariino)
Schmiedestr. 99
47809 Krefeld, Germanio
ina-asocio@web.de

Ankaŭ malgranda revuo vivas de la kunfarado de siaj legantoj kaj de la artikoloj de kompetentaj fakuloj.

Tial ni petas vin sendi al ni viajn manuskriptojn. Koran dankon!

Koiksa teo

Harald Schicke, Germanio

Koiksa teo estas la plej nova oferto de la en Esperantujo jam vaste konata [Ginsengo-Butiko](#) en Herĝberg am Harz - la Esperanto-urbo..

La botanika nomo estas *Coix lacryma-jobi*. Ĝi apartenas al la familio de dolĉaj herboj. Ĝi devenas el orienta azio. Fakte ĝi estas greno, el kiu oni produktas farunon. Tiu nutra faruno enhavas 50% da amelo, 14% da proteino kaj 6% da graso, sanigajn flavonoidojn kaj vitaminon E. Per tiu faruno ankaŭ eblas baki panon.



Foto de Keisotyo el [Vikipedio](#)

La teon el tiu koiksa faruno oni povus nomi ankaŭ supo. Ĝi tre bone taŭgas por homoj al kiuj mankas apetito kaj forto, do ekzemple kanceruloj aŭ homoj resaniĝantaj post gravaj malsanoj. Sed kompreneble

ankaŭ sanuloj profitas de la multaj valoraj enhavaĵoj.

Koiksa teo estas nur unu el naŭ por germanoj ekzotikaj koreaj teoj, kiujn oni povas ĝui en la Ginsengo-Butiko.

Kion fari dum granda varmo?

Harald Schicke, Germanio

La varma temperaturo en multaj landoj en tiu ĉi somero endanĝerigas precipe maljunulojn, kiuj tro malmulte trinkas, sed ankaŭ infanojn.

Al maljunuloj ofte mankas la sento pri soifo. Infanojn timemaj gepatroj vestas ofte tro varme kaj ne donas al ili sufiĉe da akvo.

La plej grava tasko estas do trinki pli multe. Tio povas esti minerala akvo sen gaso, eble kun suko, teo aŭ en lando kun nature produktata biero ankaŭ biero, prefere senalkohola.

Nia natura klimatizilo, la haŭto, funkcias nur, se ni trinkas sufiĉe da akvo. La ŝvito servas por forigi troan varmon.

La akvo devas estis sengasa, ĉar akvo kun gaso (en Germanio tre ŝatata) donas senton de pleneco. Tial oni ne trinkas sufiĉe. Akvon kun gaso mi uzas

por pacientoj, kiuj deziras malpeziĝi. Ili trinkas antaŭ la manĝotian akvon.

Eĉ se oni trinkas sufiĉe, la varmo povas kaŭzi kolapson. Tion oni povas preventi meti la subbrakojn sub fluantan malvarman akvon el la krano. Vi ĉiam komencu per la kor-fora flanko, do dekstre. Alikaze oni povas meti siajn subbrakojn al akvo, kiel montrite en la foto de *Kneipp-Bund*.

